

PROTOKOLO: Estrarkunsido de ILEI

Nov 27-30, 2009. Roterdamo

Ĉeestis dekomence: Duncan Charters (DC), Stefan MacGill (SMG), Małgosia Komarnicka (MJK), Radojica Petrovic (RP), Zsófia Kóródy (ZK), Julija Batrakova (JB)

Vendrede: Nov 27, 9 atm – 6 ptm en Hotelo Van Walsum.

1. Malfermo kaj Bonvenigo

1.1 Konfirmo de tagordo.

La tagordo de SMG estis akceptita.

1.2 Protokolado kaj raportado.

Protokolas la sekretario de ILEI, MJK. Samtempe, ni pretigos notojn por raporto de la kunsido sendenda al IPR tuj post (aŭ dum) la kunsido, kune kun fotoj. Gravaj prepari biografiojn de la estraro por la hejmpaĝo kaj eventuale por IPR 2010/1.

1.3 Strategio por kompilo de laŭmonata plano.

La plano kompiliĝos dum la estrarkunsido. SMG respondecas finprodukti ĝin.

2. Sekcioj kaj membraro.

2.1 Sekcioj bezonantaj apartan atenton

Britio – La kvin membroj pagis rekte tra UEA kaj ne tra la sekciestro Angela Tellier kaj ĝi apenaŭ funkcias kiel sekcio. Mankas komitatano sed ja venis jarraporto pri 2008.

Belgio – delonge ne estas kontakto kun Iwona Kocięba; siatempe ege aktivis. SMG parolis momente kun Flory Witdoeckt dum la malferma tago pri reaktiviĝo. La 9 membroj pagas rekte tra FEL, sed mankas komitatano kaj raporto 2008. SMG skribos al Iwona demandante ĉu ŝi deziras esti plu sekciestro.

Irano – MJK kelkfoje skribis al Reza Torabi, sed li ne respondas. SMG same. Neniu membro anoncitas, neniu komitatano, neniu raporto 2008. Reza membras en la ekzamena komisiono, ni eble povos atingi lin per tiu vojo... RP substrekis, ke gravas havi ILEI-sekciojn en ĉi tiu regiono (Irano - Reza, Kari... Armenio- Lida kiel reprezentanto). Reprezentanto (se valora) estu subtenata el la Koleghelpa kaso. Taskon revivigi la iranajn sekciojn prenos RP.

Rusio – raportis RP. La sekciestinto Irina Gončarova multe aktivas inter junuloj, sed ne raportis pri 2008 kaj la sekcio ne plu havas la necesajn 5 membrojn. En la listo de la sekretario estas nur 1 ILEI-membro Aleksander Melnikov sed en la listo de la kasisto estas 1 alia membro: Elena Nadikova. SMG skribos al Irina G, ĉar ne estas sufiĉe da membroj... Grava tasko – restarigi sekciojn en Rusio.

Ukrainio – notita sed ne diskutita la malfacila situacio. Estas ekzistanta sekcio kun 9 membroj, sed neoficiala kaj neanoncita kunsido klopodis starigi paralelan asocion, kiun ILEI ne povas agnoski. Kontaktoj daŭras konvinki la du grupojn kuniĝi ene de la ekzistanta sekcio. [Postnoto Dec 20: Akordo atingita, formiĝis per novaj elektoj unu pli forta sekcio.]

Brazilo – havas grandan aktivan sekciojn, sed la sekciestro pro tro da laborŝarĝo devas demisii. Raportis detale pri 2008, sed atendas novajn elektojn antaŭ ol nomi komitatanojn. Kadre de la kampanjo starigi retan voĉdonadon inter komitatanoj, ni instigu ilin trovi sekciestron kaj komitatanojn (MJK jam informis pri ebleco nomumi provizoran brazilan sekciestron)

2.2 Novaj sekcioj

Hispanio – Ni havas maturan aliĝpeton, decidite ke ni plusendos ĝin al la komitato, tuj kiam la principoj de reta voĉdonado estos organizitaj. SMG respondecos pri ambaŭ paŝoj. Lau la Statuto 7.3.1 Sekcio agas en difinita teritorio. Ni jam havas sekciojn en Katalunio, kiu

respondecaj pri tiu teritorio. Se venas demando pri kiu teritorio respondeca la nova hispana sekcio, la respondo devas esti: Hispanio. Sed ĝi praktike lasas al la kataluna sekcio la taskon plenumi la agadon ene de Katalunio. SMG korespondos por konfirmi tiun komprenon.

Kongo – La estraro kun ghojo konstatas la sekcion en Kongo kaj atendas la aliĝpeton. RP tenos kontaktojn kaj klarigos la proceduron punkton post punkto. Ni kuraĝigu la sekcion kaj helpu ĝin.

Portugaliao – SMG korespondis kun aktivulo pri Juna amiko pri la eblo fondi sekcion.

Pakistano – SMG simile faris kun nia nuna reprezentanto; sekvota, kune kun RC.

Korea Respubliko - SMG salutis la nacian kongreson; en 2008 la sekcio havis malsufiĉajn membrojn kaj malaktivis dum kelkaj jaroj. La sekciestro nun bele reaktiviĝas, same kiel en Ĉinio. RP proponas plian azian ILEI-konferencon – reala eblo se UK okazos tie en 2012. Necesas fortigi la ĉeeston de ILEI en Nepalo, Pakistano, Barato (kie povus stariĝi sekcio), Vjetnamio, Mongolio (Azia Kongreso en 2010)... grava regiono... Ni devas „tuŝi” la regionon... montri, ke ILEI agas.

2.3 Novaj kaj neaktivaj reprezentantoj

Analizenda. Nediskutita pro tempomanko. SMG: Se ni havas reprezentanton, kiu nenion faras ni povas serĉi alian. RP proponas, ke reprezentantoj faru ankaŭ jarraporton... dank’ al tio ni pritaksos ĉu ili fakte laboras.

2.4 Membrokampanjo 2010

Malnetoj de kelkaj varbiloj estas cirkulitaj. Ili prezentu la internacian adreson kaj sekciestro faros/aldonas lokajn detalojn. ZK proponas: Se iu aliĝos rekte al ILEI la sekretario informu la koncernan sekciestron... MJK informis, ke Josefo Shemer (IL) mem trovis nin kaj deziris fariĝi membro de ILEI; ni ligis lin kun la reprezentanto kun ideo fondi sekcion. RP: oni devas ŝanĝi la vortumon en la teksto klarigante kiel fondi sekcion: “Sekciestro ne devas esti difinita oficulo en la Sekcio, sed normale estas minimume estrarano...” Akceptita. La propono estas pli rigore difini ke la sekciestro estas la prezidanto aŭ sekretario de la sekcio.

Ni fidus ke la sekcioj varbos inter la ekzistantaj membroj. Ni devas kuraĝigi varbadon inter instruistoj aŭ interesitoj pri edukado kiuj ne estas membroj. La varbado estos ĉefe reta, koncentriĝu je ŝlosilaj landoj kaj celu:

- Deleĝitojn de UEA pri instruado aŭ edukado (MJK listigu ilin)
- Landajn Asociojn de UEA, kiuj havas la plej kompletan superrigardon pri siaj landoj.
- Abonantojn de Juna amiko, el kiuj surprize multaj ne estas ILEI-membroj.
- Vizitantojn al partneraj retpaĝoj – edukado.net, lernu.net, ALIE, E@I, (ekzemple per reta disponigo de numero de IPR aŭ unuopaj artikoloj. Se eble ni rekte aliru iujn uzantojn de tiuj retejoj.

Propono el Ĉinio: fari mebrokartojn (laŭ la modelo de UEA). Esplora kiel ni finacu tion kaj prizorgu la liveron (pli granda kosto). MJK demandas pri tio sekciestrojn. Se estas nova membro la sekretario povos sendi salutvortojn al la membro kun la mebrokarto kun kopio al la estro de la sekcio.

Ni pretigos fizikan varbilon por dissendo kun Juna Amiko 2009/3 (aperigo malfrua, ne antaŭ februaro 2010): Tio varbu ducele: abonado al la revuo, membriĝo en ILEI.

2.5 LS raportoj 2009

SMG unue kompletigos la raportojn 2008 (necesas aldoni Pollandon), kaj kun MJK preparos modelon por 2009. [Postnoto: tamen okazis invers-orde!] La skemo inkluzivu sekcion kie ili raportu kiel ili varbas membrojn, por instigi ilin provi novajn manierojn. Ankaŭ ĉu ili ricevas subvenciojn...ktp. Limdato por respondoj, laŭ la Statuto estas Marto 31, 2010. Ni aperigu la raporton ĝis Aprilo 30, eĉ se ne ĉiuj sekcioj sendos respondojn.

2.6 Koleghelpa kaso

Ĝis la 15-a de januaro estas limdato decidi kiu ricevos helpon pere de Koleghelpa kaso. Ni devas unue vidi ĉu la personoj agas, kaj ĉu tio protektas sekcion aŭ aktivantan

reprezentanton. Se oni donacis por subteni nomitan unuopulon, ni evidente respektas tion. Ni faru kampanjon, precipe inter A-landoj, kiu deziras helpi aliajn kolegojn fariĝi membro de ILEI. MJK, JB, RP kompilu proponliston por KhK. MJK kontrolu ĉiujn retadresojn de sekciestroj kaj komitatanoj por certigi pri aktualeco (ili aperos fizike en IPR 2010/1) kaj certigu la aktivadon de ĉiu KhK-kandidato.

2.7 Honoraj membroj

Limdato por kandidatoj por Honoraj Membroj estas la 31-a de marto. Februare MJK devas fari alvokon al sekcioj kaj komitatanoj por proponoj.

2.8. Sekcia kaj komitata gruplistoj

RP estas posedanto kaj Atilio estas moderato, ĝi troviĝas ĉe Yahoo. Decido: malfermu novajn gruplistojn ĉe Google, ĉar tio estas plene unikod-konforma kaj formatigas mesaĝojn pli bone. Krome Google ebligas automatan membriĝon. SMG skribos al la sekcioj klarigante la planojn. RP montros al MJK kaj ZK, kiel mastrumi la transiron, ke ŝi sendu invitmesaĝojn al sekcioj kaj komitatanoj. Ni ĉesigos sed ne nuligos la grupojn ĉe yahoo, kiu havu transsendan tekston.

3. Komitato kaj komisionoj

3.1 Kompletigo. Naŭ mankantaj lokoj.

SMG konaktos sekciojn en Britio, Brazilo, Belgio kaj Norvegio pri nomigoj de komitatanoj, antaŭ ol lanĉi retajn voĉdonojn. Diskuto ĉu doni voĉojn al individuaj membroj: tiuj kiuj membriĝas rekte al la internacia ligo, kiel faras UEA; decidite: unue ni okupiĝu pri seciaj membroj, kaj poste pri individuaj membroj, (malgaŭ, ke la Statuto ne estas preciza: RP). Pripensinda ĉu plue akcepti, ke unu komitatato povas anstataŭigi 3 aliajn. Ni ne ŝanĝu la regularon por nun.

3.2 Voĉdonoj kaj informoj

La aliĝpeto de Hispanion estos la unua voĉdonaĵo post la akcepto de reta voĉdonado. Ni informos al komitatanoj, ke la nova estraro konfirmas la decidon de la antaŭa konsideri reaktiviĝintan ĉinan sekcio la daŭrigo de la siatempa sekcio, sen la neceso realiĝi (kaj plie gratulas tiun renovigon).

3.3 Komitatan limdatoj 2010

La jarraportoj devas esti verkitaj malnete ĝis marto 31, cele al livero de la konferenc-kunsidaj materialoj ĝis la fino de majo, prepare al la kunsidoj en Kubo. Dissendo estos reta, sed ni krome aperigu ĉiun materialon en la retpaĝo kaj disanoncu ankaŭ tiun fakton; en mondo de amasfatrasspamado, ni ne rajtas supozi ke sendo egalas al ricevo. Ĉiu havu duan vojon trovi la materialon.

3.4 Komisionaj raportoj

Respondecaj estraranoj faru aŭ akiru raportojn ĝis marto 31, 2010, por ke MJK kun SMG pretigu kompilon. La lerneja komisiono zorgu pri kontaktoj kaj interprojektoj kaj kontrolu ĉu ĉiu klaso en tiuj projektoj estas listigita en edukado.net

Terminara Komisiono: RP - difinu ĝuste terminojn ekz. ‚aplikata interlingvistiko’: en Europo estas kelkaj difinoj, en Usono pli strikta.

Universitata Komisiono DC: konfirmi kun Kristin kaj Ilona pri universitataj kursoj.

Scienca Komitato por IPR: DC prizorgos tion, kaj serĉos novan sekretarion (kiu povus esti la nuna). Deziro ke ĉiu faka artikolo havu regulojn kiustile oni devas fari ĝin.

Ni intencas lanĉi en la hejmpaĝo novan apartan paĝon pri la komisionoj: ĉiu komisiono havas gvidanton, li/ŝi devas prezenti la celojn de la komisiono, kelkajn vortojn pri projektoj, kiel ili plenumos ilin kaj kun kiuj ili kunlaboros.

4. Financo – komenca traktado

4.1 Raporto pri transdono

JB raportas pri la produktiva kasista transdono (septembra kunsido en Svedio) kaj ŝia sukcesa konatiĝo kun la komputila librotenada sistemo.

JB eksplikis ŝanĝojn kiujn ni devas fari por anstataŭigi malnovajn estraranojn per la nova estrarao ĉe nia enskribiĝo en la komerca ĉambro en Hago. [Postnoto: [intertempe kompletigita](#)]. Tio estas antaŭkondiĉo por malfermi novan bankkonton en Nederlando. Restas decidenda kiom kaj kiam ni transigos kapitalojn.

Ni devas akiri pli da scioj sur kiu servilo kuŝas niaj librotenaj programoj kaj datumoj kaj scii la protektajn meĥanismojn, por ke ni ne dependu de unu servilo aŭ unu persono por protekti ĉion.

4.2 Rezultoj de la krakova konferenco

Ni ege bezonas scii la nunan staton kaj perspektivojn por fermado. La antaŭa kasisto, Sjoerd Bosga, havas la datumojn kaj prenas la respondecon fermi tiujn kontojn. Sen tiu rezulto ne eblas fermi la kontojn 2009 kaj malfacilas fiksi kredeblan buĝeton por 2010.

4.3 Konataj revizioj por buĝeto 2010 (finenda lunde)

JB nun ne faros kalkulojn de la buĝeto 2010, ĉar ŝi ne havas kalkuladon de Sjoerd pri la krakova konferenco. JB klarigas al estraranoj kiel uzi formularon pri repago de siaj laborkostoj. SMG proponas kiel iomete ŝanĝi repagon de estrarkunsidaj kostoj por 2010, por ke tiuj ne aktive malkuraĝigu al estraranoj partopreni en Kubo. RP subtenas ĉeeston de necesaj estraranoj realigi la laboran kaj fakan programon, sed skizas eblojn tion prizorgi tra la buĝeto de ligitaj aranĝoj, por ne ŝarĝi la konferencan aŭ la ligan buĝeton.

SMG anoncas serion da novaj kostoj, neantaŭviditaj en Krakovo, ĉefe por protekti ĝisnunajn agadojn aŭ plenumi devojn hereditaj el la antaŭa periodo, ekzemple:

- Juna amiko: 400 EUR aldone por kovri novajn enpaĝigiston, rubrikestron kaj redaktoron.
- Hejmpaĝa prizorgo: 200 EUR: la laboro ege kreskis kaj en 2010 pli kreskos.
- Lernolibro Felszeghy: 300 EUR. Delonge akceptita; bezonas apartan redaktoron/manĝeron.
- Simpoziaj libroj 2005-2008: 400 EUR. 2009 kovrota en Pollando, aliaj bezonas redaktoron. [Postnoto: [redaktoro por unu kajero trovita](#).]

Mankas klaraj ideoj kiel ni kovros tiujn ekstrajn kostojn. JB kaj SMG sekvos tion.

Dum tiu punkto aldoniĝis Claude Nourmont (CN) kiel reprezentanto de UEA.

Oni komencas diskuti detalojn de iuj supremenciitaj projektoj:

Pola simpozia libro: La pola sekcio eldonos la ĉi-jaran libron, laŭdeble* ĝis la jarfino por eluzi enlandan subvencion. Aida estos petita liveri ajnan plian materialon ene de 7 tagoj, ekde kiam oni fermos la enhavon. DC kaj ZK plenumos rapidan provlegadon, cele al fizika presado en Pollando en tre malgranda eldonkvanto, sufiĉe por plenumi la bezonojn de la kontribuintoj. Plie, la enhavo estos rete eldonita.

Pliaj simpoziaj libroj: Mankas tiuj por Parma, Benino, Kaunas kaj eble pli. Eblus aperigi ilin en kajero formo au en IPR au rete en formato PDF. Decidite ke la simpozio en Parma havas prioritaton. DC ricevas la materialon kaj konsentas analizi ĝin kaj raporti ĝian amplekson kaj staton. Jozefo Nemeth postkunside konsentis redakti la materialon, cele al limigita fizika presado kiel aparta kajero, kun reta disponigo de la materialo.

Juna amiko: RP reprenas sian jam prezentitan proponon, por bonigi la financan rezulton de la revuo. La rubriko pri Interkulturo enhavu materialon kun pli rekte interkultura emfazo (malpli esperantisman) – la projekto Interkulturo liveru tion -, sekve la revuo fariĝu labororgano de la projekto kaj klasoj el la diversaj interkulturaj projektoj (ne nur ‘Interkulturo’) faru kvantajn mendojn.

4.4 Financaj Limdatoj 2010:

Kontoj 2009 aprobitaj, krakova finkalkulo, gravas ricevi tra 2010 regulaj raportoj pri progreso por la jaro 2010, kio tute mankis tra 2009. Ni celu ricevi raporton pri la atendeblaj rezultoj de la kuba konferenco ene de monato post la fermo kun klara celdato por la fermo de la kontoj.

Sabato 28.11.2009, 8.30 – 9.30 atm:

(labora postmatenmanĝo ĉe kubodomo) ZK, MJK, SM, DC, RP kaj Ana Montesinos (AM)

RP prezentis la proponon pri la sekva konferenco (2011) estu Kopenhago, Danio. Estas ankaŭ propono el Herzberg, Germanio.

Danio – Proponata estas la Universitato de Kopenhago, simpozio kun prof. Philipson de FILPV estas jam konkrete planata. La universitato disponigos senpagan konferencejon. Matoro de la LKK estas Ileana Shroeder, kun almenaŭ du pliaj helpantoj. Ŝi estas samtempe Prezidanto de la LKK de la UK. Loĝigo estas provizore rezervita kadre de la UK-laboroj ĉe hotelo ene de 5 minutoj de la konferencejo, je ĉ. 60eur (900 danaj kronoj)/po persono/po nokto. Manĝoj estas favore preze akireblaj en universitata manĝejo. Temo de la simpozio: „lingvaj problemoj” au alia temo: RP donos ĝin poste, sed temas pri komunikado (ni bezonas trejnadon en ĉi tiu parto)... Por la Simpozio ni havas favoran kondiĉon... povas esti, ke akireblos subvencio.

Germanio – La estraro ricevis skriban proponon. ZK En 2012 en Germanio ne eblas fari la konferencon....En 2010: senpaga konferencejo, pli favoraj hotelaj prezoj ol Danio, ev. Simpozio en Goettingen

RP Simpozio en Danio estos bone preparota. MJK en Herzberg ĉio estos bone organizita kaj malpli kosta. Krom tiuj kelkaj intervenoj, ne restis tempo plie diskuti. Daŭrigita dimanĉe.

Partopreno en la malferma tago de CO (raportita aliloke). Malformalaj kunsidoj kun Mireille Grosjean pri la ILEI-ekzamenoj, Katalin Kovats pri i.a. <edukado.net> kaj JB/SMG kun du estraranoj de IEI pri la estontaj rilatoj IEI-ILEI.

Parto 2 de la protokolo kovras la kunsidojn en dimanĉo kaj lundo.

Protokolis: MJK. Postredaktis: SMG.

* Ni rezistas korekti tiun mistajpon, ĉar la malintencita formo en la kunteksto pli bonas ol 'laŭeble'. Plie, ni pretendas kopirajton je tiu laŭdebla vorto. © ILEI, decembro 2010.